

la Riverego

Bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia
Somero de 1990. N^{ro} 19^a. Jarkolekto 5^a.

0,75 \$



Amikeca reto

La première page reproduit celle de la liste de l'*Amikeca reto* de S.A.T. Service relativement nouveau, ce réseau permet d'être hébergé et de participer aux activités de plus de 300 inscrits. Pour de plus amples renseignements, contacter Reni Porter, dont l'adresse apparaît à la fin de l'article.

Unuapage vi povis vidi la titolpaĝon de la listo por 90-91 de la *Amikeca reto* de la *Sennacieca Asocio Tutmonda* (S.A.T.). Ĝi estas la *Socivojaĝa servo de S.A.T.* Iel simila al la *Pasporta Servo* de la *Tutmonda Esperantista Junulara Organizo* (TEJO), la *Amikeca reto* ne nur ebligas senpagan aŭ malaltkoston tranoktadon. Ĝi ankaŭ celas amikigon inter Esperantistoj. Tiucele, la akceptantoj disponigas informojn pri viziteblecoj, dividindaj aktivecoj,

esperataj diskuttemoj. La lasta listo donas informojn pri 268 adresoj (eĉ pli da homoj) en 33 ŝtatoj.

Bedaŭrinde, estas ĝis nun neniu akceptanto en Kebekio. Do, se vi volas iĝi tia aŭ simple ekhavi pli multan informon pri la *Amikeca reto*, vi povas kontakti la ĉi-regionan peranton:

Reni Porter
71 Ridgevalley Road
Halifax (Nouvelle-Écosse)
B3P 2E5

la Riverego

Bulletin trimestriel de la Société québécoise d'espéranto.

La Riverego estas eldonata de Esperanto-Societo Kebekia. Aperas trimonate. Eldonkvanto : 200.
ISSN 0830-9574. Dépôts légaux: bibliothèques nationales du Canada et du Québec.

Premier trimestre 1986.

Redaktis: Sylvain Auclair.

Kunlaboris Suzanne Bolduc, Victor Epp, Martin Lavallée, Régis Ostigny, Cyrille Robidoux, kaj Yanick Viau

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.

Senpage por la membroj de E.S.K. Por la aliaj: jara abono: 5 \$ por mara sendo; 6 \$ por aera sendo.

UEA-kodo: kebk-d.

Unuopa numero: 0,75 \$, plus sendokostoj.

Limdato por la venonta numero : 1-a de septembro de 1990.

Adreso: Esperanto-Societo Kebekia
C.P. 126, succ. « Beaubien »
MONTRÉAL, QUÉBEC
KANADO H2G 3C8

telefonrespondilo: (514) 272-0151

Denove en Saint-Irénée

La pasintprintempa renkontiĝo en Saint-Irénée, en Charlevoix, estis tiel ŝatata de la partoprenantoj, ke ĉiuj deziris reiri tien. Jen. La aŭtuna renkontiĝo de ESK okazos denove en Domaine Forget, samloke kiel pasintan fojon. La programo ne estas preta; ĝi tamen similos la kutimajn programojn de la ESKaj renkontiĝoj, kun kurso por komencantoj, kulturaj eroj, babilado, promenoj en naturo, movada diskutado, kaj ĉi-foja vizito al La Malbaie. Ĉiaj proponoj estas bonvenaj.

Dato: dum la Dankfesta semajnfino, de la 6^a ĝis la 8^a de oktobro 1990.

Kosto: por aliĝoj ĝis lundo 24^a de septembro (laŭ poŝta stampo)

plenkreskuloj:	40 \$
favorkotizajESK-membroj:	30 \$
infanoj sub dek du jaroj:	20 \$

Le site de la rencontre du printemps dernier, à Saint-Irénée, dans Charlevoix, a tellement emballé les participants que nous nous étions jurés d'y retourner. Voilà. La rencontre de l'automne aura lieu au Domaine Forget, comme l'autre fois. Le programme n'est pas encore prêt, mais il ressemblera certainement à celui des autres rencontres de la S.Q.E.: cours pour débutants, éléments culturels, conversations, promenades dans la nature, discussions sur le mouvement, et, cette fois-ci, visite de La Malbaie.

Post la 24^a de septembro:
50 \$ por ĉiuj. Aliĝu
frue...Aliĝu TUJ...

Por ĝui la favorajn kotizojn, necesas sendi al ESK, ĝis la 24^a de septembro, nerepageblan antaŭpagon je almenaŭ dek dolaroj por ĉiu aliĝanto.

Atentu: la aliĝkotizo ne inkluzivas la manĝojn. Sed estas disponebla tute preta kuirejo. Kunportu manĝaĵon. Vi loĝos (por du tranoktoj) en dometoj, por tri ĝis kvin homoj, kun provizitaj littukoj.

Neniu aŭtobuso iras al Saint-Irénée. Plej proksimaj haltejoj estas en Baie-Saint-Paul kaj La Malbaie. Se vi havas veturbezonojn aŭ, male, veturproponojn, bonvolu kontakti ESK-on: (514) 272-0151.

Toutes les idées sont par ailleurs bienvenues.

Date: durant la fin de semaine l'Action de Grâce, du 6 au 8 octobre 1990.

Coût: si vous vous inscrivez d'ici au lundi 24 septembre (selon le cachet postal)

adultes:	40 \$
membres à cotisation réduite:	30 \$
enfants de moins de 12 ans:	20 \$

**Après le 24 septembre: 50 \$
pour tous. Inscrivez-vous dès
MAINTENANT...**

Pour bénéficier des meilleurs prix, envoyer d'ici au 24 septembre à la S.Q.E. un dépôt non remboursable de 10 \$ par inscription.

Notez bien: l'inscription ne comprend pas les repas. Vous bénéficierez de cuisinettes tout équipées. Apportez votre propre

nourriture. L'hébergement (deux nuitées) aura lieu dans des maisonnettes pouvant accueillir de trois à cinq personnes. La literie est fournie.

Aucun transport public ne dessert Saint-Irénée. L'autobus se rend à Baie-Saint-Paul et à La Malbaie. Si vous avez des besoins de transport ou, au contraire, pouvez offrir des places, contacter la S.Q.E.: (514) 272-0151.

Koncerto en Esperanto: *Lumkantoj*

La création d'un œuvre musicale en espéranto aura lieu à Montréal, sans doute au début de l'hiver 1991. Il s'agit d'une œuvre classique, pour chœur, piano et orchestre, création du pianiste et compositeur franco-québécois Claude-Gérard Sarrasin. Les profits de la soirée seront versés à Amnistie Internationale.

Post kelkaj monatoj, verŝajne en januaro 1991, okazos en Montrealo koncerto kun granda nova originala verko en Esperanto. Ĝi estas organizita de la senprofitcela organizaĵo *Productions artistiques et culturelles Nova Mondo*, kies vicprezidanto estas membro-Amiko de ESK, Christian Chamberland. Ekhavis li la ideon, ke la tuto estu en Esperanto. La profitoj de la koncerto iros al la kanada franclingva sekcio de Amnestio Internacia (bedaŭrinde ne al E.S.K...).

La prezentota verko estas klasikmuzika kreaĵo de Claude-Gérard Sarrasin, franco loĝanta en Kebekio de jam 28 jaroj, pianisto kaj muzikverkisto. Li jam verkis tiajn muzikaĵojn, kaj delonge revis pri granda koncerto lia kun ĥoro. Kaj tiel estos. La titolo de la verko estas *Lumkantoj*, kaj Sr^o Sarrasin verkis kaj la tekston kaj la muzikon, iel

Verdiecan, kun iom da *Brahms-eco*. La tekston estis elfrancigita far du pli spertaj ESK-anoj, kaj la muziko estis finverkita laŭ la esperantaj versoj. La teksto, tre poezia, temas pri apero de nova homeco, pli paca kaj pli fratama. Tial Esperanto sentiĝis kiel plej taŭga lingvo.

La trimovimentan koncerton muzikigos kordorĥestro kun piano kaj kvardek muzikistoj kaj ĥoro kun sesdek gekantistoj. Ĝi okazos aŭ en *Place des Arts*, aŭ en la halo *Claude-Champagne* de la Fakultato pri Muziko de la Montreala Universitato. Povas esti, ke okazos antaŭunua prezento en Saint-Sauveur, iam fine de aŭtuno.

Jam okazis du antaŭkoncertoj en Montrealo, cele al monakiro por la ĉefa aranĝo. Oni tiam aŭdigis verkojn de Sr^o Sarrasin kaj pli faman klasikan muzikon. Ambaŭ okazaĵoj havis bonan ĉeestantaron. Nenio estas antaŭvidita dum somero.

Amnestio Internacio trovas la ideon tre bonan, kaj ankaŭ povas pli bone ekscii pri Esperanto. Cetere, la tuta ĉeestantaro povos multon ekscii pri la internacia lingvo. La vesperlibreto prezentos *Novan Mondon, Amnestion Internacian,*

Esperanton kaj la Esperanto-Societon Kebekian, kaj la teskton de la verko, en du lingvoj. Krome partoprenos reprezentantoj de A.I. kaj de E.S.K.

Espereble ni povos renkontiĝi ĉe tiu grava aranĝo. Ĝis!

Nos questions, vos réponses

Martin Lavallée

Jen resumo de l' respondoj de la januara demandaro. Dek du respondis, foje same, foje malsame. Iuj eĉ foje faris longajn komentojn. Dankon.

La Riverego de janvier contenait un questionnaire destiné aux membres. Cet article se veut un résumé des principales réponses.

Douze questionnaires sont revenus. Cinq en espéranto et sept en français. Seuls les premiers affirment être en mesure de communiquer en espéranto.

Les espérantophones veulent voyager et contacter les habitants des pays visités; ils ne veulent pas passer leur vie à apprendre des langues. La riche littérature espérantiste est aussi une raison invoquée.

Les Amis de l'espéranto trouvent que l'espéranto a un aspect international différent de celui de l'anglais. La correspondance suscite un certain intérêt.

Les intérêts des espérantophones et des Amis de l'espéranto convergent: langues, voyages, paix, écologie, musique.

On prend contact avec l'espérantophonie non via des fanatiques mais plutôt par hasard. La curiosité l'emporte sur les préjugés de l'entourage. Les articles de

journaux et les affiches sont aussi efficaces. Le contact de personne à personne trouve aussi sa place, à la condition qu'il soit teinté d'objectivité et repose sur des faits.

Critique: *Les rencontres saisonnières de la S.Q.E. deviennent trop des jardins d'enfants. Les enfants ont pleinement leur place dans le mouvement et dans les rencontres, mais il devrait y avoir place aussi pour des questions sérieuses dans un débat LIBRE. La papago (= le perroquet, journal quotidien téléphonique, 270-005) devrait disposer d'une ligne 800.*

Les informations sur les activités viennent trop tôt. On devrait en être informé par lettre trois semaines à l'avance. On aiderait bien comme bénévole, mais on ne sait comment.

Pour le bulletin *la Riverego*, le compromis français 50% - espéranto 50% semble bien accueilli. Des questions plus sérieuses, actuelles et importantes, devraient y être débattues. Il doit y avoir des articles sur les langues, l'espérantisme, des nouvelles, reportages, événements, annonces, entrevues.

La majorité des répondants exige des photos pour *la Riverego*. Commentaire d'un membre à ce sujet: *Sans hésiter, oui. Une photo vaut mille mots, elle permet de mieux capter l'attention et de faire comprendre un sujet qui pourrait paraître aride. La Riverego est vendu en magasin. Je suis certain qu'avec une bonne photo en première page, on paierait plus vite sa réadhésion et les intéressés(ées) afflueraient.*

La majorité désire que *la Riverego* soit plus épaisse et plus fréquente (tous les deux mois).

On demande des récits de voyages. On devrait éviter de parler de politique, de violence, d'écologie. *Cependant un lexique pourrait être utile.* On demande aussi des b.d. (bandes dessinées).

Proposition: connaître les noms ou les adresses des membres. À raison d'une région à la fois,

mentionner les nouveaux espérantophones et ceux qui le sont déjà. [Note: les membres de la S.Q.E. peuvent depuis toujours recevoir gratuitement la liste des membres de la Société.]

Quant à la question de savoir si la S.Q.E. devrait devenir une association nationale directement affiliée à U.E.A., les espérantophones hésitent: Clarifiez en premier lieu ce que cela changerait. Aussi: *Le Québec a seulement cinq délégués de U.E.A. Les associations tchèque, slovaque, soviétique, lituanienne, lettonne ont beaucoup de membres.* D'autres désirent que la S.Q.E. n'informe pas uniquement en français pour qu'elle soit vraiment représentative de la société multiculturelle québécoise. Dernier commentaire: *je n'en vois pas la nécessité et je suis neutre sur ce point.*

Propagandi la movadon Kiel, kie kaj al kiu?

de Reĝo Ostigny

Régis Ostigny fait ici des commentaires et des propositions sur la publicité de l'espéranto. Il veut viser la clientèle étudiante.

Nu, en Kebekio, la esperanta propagando de tri jaroj ne bone funkcias. Ni bone povas konstati tion, ĉar ni ne havas lernantojn al kiuj instrui la lingvon. Pro tio, nia motivo paroli pri Esperanto kaj agadi por plibonigi la movadon malkreskas pli kaj pli. Kompreneble paroli la internacian lingvon ĉiam kun la samaj personoj ne motivigas nin. Do, kion fari?

Unue, ni devas konigi la esperantan movadon, ĉar la homoj, aŭ

ne aŭdis pri Esperanto, aŭ nur erare scias, ke Esperanto ne funkcias. Vi jam spertis tion, mi scias. Nu vi sendube parolis pri Esperanto al viaj geamikoj. En la reago ĉiam estas la ombro de la angla lingvo, ĉu ne?

Dum la lasta lernjaro, mi kaj amikoj sukcese starigis budon en Cégep Montmorency, en Laval. Tridek personoj donis sian nomon por kurso kaj ni disdonis pli ol ducent unuajn lecionojn de la koresponda kurso. Ni fondis klubon

en la Cégep. Certe ni refaros la sperton denove, kun akcento ĉe la vojaĝa aspekto: «Reprezentu vian kolegion en la internacia junulara kongreso, kiu okazos en Svedio dum la somero 1991!» Ni akceptos ankaŭ la aliulojn, kiuj volas nur lerni Esperanton pro la ideo.

Do mi ne scias, ĉu mi respondas al la demandoj: kiel, kie kaj al kiu propagandi? ĉar viaj ideoj certe tiel bonas kiel mia agado. Sed se vi volas propagandi la esperantan movadon, ni ja akceptos vian helpon kaj viajn vidpunktojn.

Le congrès de Racine

Janiko Vijo

C'est à Racine en Estrie que s'est déroulé le dernier congrès de la Société québécoise d'espéranto les 9, 10 et 11 juin 1990.

Les vingt-trois participants qui s'étaient donné rendez-vous à l'Auberge de la Grande Ligne, située en pleine nature, ont en effet eu la chance de pratiquer intensivement la langue durant les activités et l'Assemblée générale de la S.Q.E., à laquelle seuls les «veraj esperantistoj» assistaient (quelques débutants étaient présents à cette fin de semaine). On a pu y rencontrer des espérantistes d'un peu partout au Québec et même d'Allemagne de l'Ouest et de Chine Populaire!

Aussi on a pu découvrir (en espéranto!) la surprenante histoire de la motoneigne au Musée de Valcourt et on en a appris sur la nomenclature des arbres (en espéranto) au moyen d'un rallye organisé en pleine forêt.

Si la pluie a modifié quelque peu certains projets (et la période de sommeil pour certains), elle n'a aucunement empêché la participation des gens aux «lingvaj ludoj» de Normand.

Finalement, on peut dire que c'est l'ambiance chaleureuse qui a ressorti de cette grande rencontre. Pour le congrès québécois du printemps prochain, la S.Q.E. est ouverte à vos suggestions quant au lieu de sa tenue.

Prelego pri Esperanto

La 15^{an} de februaro Paul Ronalds prelegis ĉe kunveno de la Montreala branĉo de la Kanadaj Mondfederistoj (World Federalists of Canada) pri la temo « Kial mondfederismon bezonas Esperanton ? ». La Kanadaj Mondfederistoj estas pac-organizo, laŭ kiu necesas starigi tutmondan federan registaron, tamen lasante al la nacioj kiel eble plej multe da sendependeco, por tiel certigi pacon, venkon super polucio kaj malsato, k.t.p. [Informis Paul Ronalds]

Ĉu anglalingvaj varbiloj por ESK?

Victor Epp

Victor Epp explike ĉi ĉi kialo il kros ke la S.Q.E. devras elditer ses propras delpliants en anglais. De nombrois Kebekeois sont anglophones, et l'absence de delpliant en anglais constituerait une forme de refus contraire à l'idéal vehicule par l'esperanto.

Victor Epp proponis al la estraro de ESK, ke ĝi eldonu propran anglalingvan varbilon, laboro en kiu li pretus kunlabori. La estraro rifuzis, proponante la uzon, pli malpli kiel nun, de kanadaj varbiloj kune kun tiu franclingva de ESK. Post tiu rifuzo, *la Riverego* proponis al S^{ro} Epp diskonigi sian vidpunkton. Jen.

Faktoj

1. Kebekio estas ĉirkaŭata de anglalingvanoj.
2. La angla estas grava kebekia lingvo, multe pli grava ol ajna alia krom la franca, tiom pli grava, ke tute ne povas temi pri «se ni havus anglan varbilon, ni devus havi ankaŭ varbilojn en multegaj lingvoj».
3. Oni ankoraŭ parolas la francan en Kebekio ĉar Kanado protektis tiun rajton. Tute ne veras, ke la franclingvanoj sukcesis gardi tiun lingvon malgraŭ la kanado *premado*, *okupo* aŭ alia malprava esprimo.
4. Multaj kebekianoj estas/os devigataj serĉi vivrimedojn ekster Kebekio (ĉu kanada, ĉu sendependa), plejparte en anglalingvaj medioj. (Ĉi-flanke, ĉu vi konscias, ke Kebekiaj dungantoj ne kapablos dungi la nombron da inĝenieroj, kiujn elbakas la sola McGill? kaj ĉi tiu ja ne estas la sola kebekia universitato, kiu elbakas inĝenierojn — kaj tute ne temas pri lingvoscioj!)
5. Unu objektive evidenta rezulto de (1) kaj (4) estas, ke la angla lingvo ege pli gravas al averaĝa kebekiano ol la franca gravas al averaĝa anglalingvano en Nordameriko, inkluzive de Kanado.
6. La *du izolecoj* malsufiĉe dialogas, parte pro la manko de *komuna lingvo* (kie Esperanto povus helpi), parte pro la manko de *komuna lingvaĵo* (kie Esperanto ne povus helpi), parte pro aliaj kialoj.
7. Zamenhof inspiriĝis favore al sia projekto precize pro interetna malpaco, miskompreno, malamo kaj reciproka izoliteco.
8. La kebekia difino de *les anglais* malpravas, sed bonege utilas al la propagando kaj agado kontraŭ angloparolantoj.
9. Ĉu agnoskite aŭ ne, kebekianoj estas homoj, do ili apartenas al la homaro. Ĉi-rigarde agnoskendas, ke eĉ la francoj mem, apartenas al la homaro, fakto kiun ili agnoskas aliĝante la Eŭropan Komunumon.

Opinioj

Laŭ la verkinto, la celo de la Esperantistaro devus esti la unuiĝo de la homoj en unu solan mondgrandan homaron, eĉ se Esperantujo iĝus speco de monda organizo kunekzistanta kun la nacioj. Tio estus tamen nur la unua paŝo, kiu montrus al la homaro la senutilon de tiom da etna fieriĝo (*fieraĉo* nur kiam ĝi portas al daŭrantaj malkonsentoj kaj al sento de malamikeco). La esperata celo estus la forigo de tiom da landlimoj kaj ĉiaj iliaj malavantaĝoj kaj prema mallibero ĝis finfine ili ne plu ekzistus kaj, anstataŭe, ekzistus nur unu nacio, kiu tamen estus regata far regionaj estraroj en kiuj la etnoj havus voĉon. Laŭ la verkinto, ekzistas almenaŭ du metodoj, per kiuj fari la duan paŝon al tia unuiĝo: pecigo de la ekzistantaj nacioj kaj rikolto de la nacioj en unu solan keston; aŭ konservi la nunajn naciojn kaj iom-post-iome unuiigi ilin, laŭ la ekzemplo de Eŭropo (alia maniero ĝis nun ne evidentiĝas), kiu finfine komencas forgesi siajn miljarajn rankorojn. (Ĉi-rigarde oni tute ne povas kompari la kebekian situacion kun tiu de la baltaj ŝtatoj. Kebekio, ĝis kontraŭa pruvo, estas fondinta

partnero de la kanada federacio, kaj ne perforte aneksita.)

Eble estas ĉar la verkinto inklinas al la dua solvo kiel la sola ebla, kaj verŝajne multaj el liaj franclingvaj kebekiaj fratoj inklinas al la unua, ke malestas interkompreno. Eble estas tial, ke la verkinto tute ne komprenas kiel iu, Esperantisto aŭ ne, kiu deziras ĉiusence aparteni al la homaro laŭ la zamenhofa koncepto pri *homaranismo*, povas purkonscience strebi al la pecigo de nacio. Estas eble tial, ke la verkinto ne komprenas la limigon de varbo al la nuraj franclingvanoj franclegantoj. Mi agnoskas, ke ĉi plejparte de la malnovaj kebekianoj povas legi la francan. Tamen, agnoskendas, ke pli da novaj kebekianoj povas legi la anglan ol la francan. Tial, se la celo estas la homaranismo, aŭ eĉ nur interkompreno, kaj ne la apartigo laŭ lingvaj linioj — eĉ *en Esperantujo* — nepras anglalingvaj varbiloj.

Eble ESK bonvenigas anglalingvanojn, sed ankaŭ necesas, ke ĝi ŝajnu tion fari. Sen anglalingva varbilo, tia ŝajno mankas. Rekomendo aniĝi al KEA tute ne estas bonvenigo en ESKon.

Demando: Al kio utilas Esperanto, se ne precize por helpi la dialogadon inter etnaj grupoj? Kian sencon havas tiam la varbado de ESK inter nur franclegantoj?

Rekomendo: La tre atenta relego, kaj eĉ studado, de la zamenhofa *Deklaracio pri homaranismo*.

Esperanto-Societo Kebekia urĝe bezonas helpantojn por siaj informaj aŭ aliaj taskoj. Eĉ po unu horo en semajno estus utila. Telefonu: (514) 272-0151.

La Société québécoise d'espéranto a un urgent besoin de bénévoles pour ses tâches d'information et autres. Même une petite heure par semaine nous serait utile. Composer le (514) 272-0151.

De par le monde

Cyrille Robidoux

Budget de crise

Le gouvernement hongrois, à la fin de l'année 1989, a dû présenter un budget de crise. Cela signifie une augmentation du prix des biens de consommation. Selon le ministre des Finances, le rejet de ce budget aurait occasionné une poussée inflationniste ainsi qu'une augmentation du taux de chômage, car désormais le Fond monétaire international n'aiderait plus la Hongrie.

Monato, février 1990

Bourses pour les interlinguistes

À la mémoire du Professeur Ivo Lapenna, qui s'est distingué par ses efforts pour promouvoir l'espéranto et surtout pour son application dans la science, le comité plénier de la Fondation Ivo Lapenna a décidé d'offrir une bourse Ivo Lapenna.

La bourse sera attribuée chaque année ou chaque deux ans à l'auteur de la meilleure thèse scientifique en interlinguistique en relation avec l'espéranto, acceptée officiellement par une université. Le choix entre les thèses proposées pour l'obtention de la bourse sera fait par une commission décisionnelle, nommée par le comité plénier de la fondation Ivo Lapenna. Pour informations: Peter Zacho, sekretario-kasisto de Fondajo I.L., Nørregårdsvej 91, DK-2610 RODOURE, Danemark

Monato, mars 1990

Le Danemark bilingue.

Selon l'institut danois de prospective, au début du prochain siècle tous les jeunes Danois seront complètement bilingues, danois / anglais.

Les motifs d'apprendre l'anglais sont nombreux au Danemark. Contrairement à la France, à l'Allemagne ou à l'Italie, les films étrangers ne sont pas postsynchronisés, mais seulement sous-titrés. Pour beaucoup de Danois, il est très bizarre que le cow-boy John Wayne dise en allemand: «Hande hoch!» plutôt que «Hands up!» (Haut les mains!).

Comme à l'université, en science et en commerce, la majorité des lectures se font en anglais, les étudiants danois préfèrent de plus en plus rédiger leur thèse en anglais et la traduire ensuite, si nécessaire. Les autres scandinaves, les Néerlandais et les Belges flamands font la même chose. En comparaison, les Français et les Allemands ne sentent pas autant le besoin d'apprendre l'anglais, car leur langue leur offre suffisamment d'opportunités, vu le rayonnement de ces dernières.

D'un autre côté, pendant qu'au Danemark, la langue anglaise n'a aucun concurrent, les Danois commencent à découvrir l'utilité d'autres langues de la Communauté Économique Européenne, permettant ainsi un contact direct avec certains membres de la Communauté.

Monato, mars 1990

Promotion de langue irlandaise en Irlande.

Le gouvernement irlandais utilise maintenant des méthodes modernes pour promouvoir la langue irlandaise (le gaélique). Les Irlandais désirent que l'Irlande, membre de la multilingue Communauté Européenne, soit reconnue comme partenaire ayant sa propre langue, en plus de l'anglais. Parmi les diverses initiatives, le gouvernement a l'intention d'inaugurer une station de télévision qui ne diffusera que des programmes en gaélique. Les autres moyens financés par l'État sont: la distribution gratuite de journaux en gaélique, de cassettes de musique, de vidéo-cassettes, de livres, de films pour enfants, ainsi que des spectacles de rue. Pendant le Festival de Dublin, on a pu voir des gens vêtus en dictionnaire gaélique, se promener dans le centre ville pour promouvoir la langue.

Monato, février 1990

Universités néerlandaises anglophones?

Le nouveau ministre de l'Éducation et des Sciences des Pays-Bas, membre du Parti Travailleuse, J. Ritzen, a rendu furieux tous les membres de la Deuxième Chambre, en affirmant que dans les universités néerlandaises, plutôt que d'utiliser le néerlandais, tous les cours devraient être donnés en anglais, afin de permettre aux étudiants étrangers de pouvoir étudier

aux Pays-Bas. En réponse à cette affirmation, un membre Démocrate de la Deuxième Chambre déclara au bulletin d'actualité, que l'adoption de l'anglais comme langue officielle dans les universités serait une atteinte mortelle au néerlandais comme langue de culture. Il ajouta que la langue deviendrait quelque chose d'insignifiant, si on s'en servait pour parler de tout, sauf de sujets scientifiques et académiques. Enfin un membre Calviniste de la Deuxième Chambre, M. Schutte, ajouta qu'il était plus important que des Néerlandais puissent suivre des cours universitaires aux Pays-Bas que des étrangers.

Monato, février 1990

L'anglais, quel anglais?

Récemment, à Londres, un juge a dû faire appel à un interprète pour comprendre un jeune témoin d'origine écossaise. Ce dernier ne parlait pas gaélique, mais la variante écossaise de l'anglais, avec sa prononciation et ses expressions propres. C'est finalement un huissier, aussi d'origine écossaise, qui a pu servir d'interprète.

On oppose souvent à l'espéranto le risque qu'il se dialectalise, en oubliant que l'anglais s'est déjà dialectalisé...

Monato, mai 1990

Rencontre de jeunes

C'est officiel: les 24, 25 et 26 août se tiendra une grande rencontre de jeunes, à Laval, sur l'espéranto. Le thème sera «l'initiation»: nous invitons alors tous les Amis de l'espéranto et autres débutants de moins de trente ans intéressés par la langue et désirant recevoir des cours intensifs (pour démarrer en force leur apprentissage ou pour améliorer la qualité de leur langue). [Suite p. 15]

Societaj informoj

Aliaj asocioj

Por plibonigi la varbadon por Esperanto, la estraro decidis ekrilati kun alifakaj asocioj, kies membroj eble havus interesojn pri nia lingvo. Sekve Normand Fleury jam kontaktis asocion de kolektantoj.

En Ontario

Povas utili kontaktoj kun najbaraj Esperanto-asocioj. De longa tempo interesiĝantoj pri Esperanto petas informon de Otavo, nun sidejo de la Ontaria Esperanto-Asocio (O.E.A.). Ili foje estas Kebekianoj loĝantaj en Otavio, foje Ontarianoj, inter kiuj troviĝas franclingvanoj. Kaj Kebekianoj kaj franclingvaj Ontarianoj povas deziri membriĝi en la Esperanto-Societo Kebekia, ĉu ne? Dank'al O.E.A., ESK povis sendi leteron al ili. Ĉiuj nun konas ESKon kaj kelkaj membriĝis en ĝi.

Ĉu informi anglalingve?

Laŭ propono de Victor Epp, membro de ESK, la estraro diskutis, ĉu la Societo devus eldoni proprajn informilojn en la angla lingvo. Ĝi konkludis, ke tio estas la tasko de K.E.A., kaj ankaŭ instigis la kanadan asocion tion fari, tiel ke ni povu uzi pli taŭgajn anglalingvajn informilojn. Nuntempe, kiam anglalingva Kebekiano petas informon ĉe ESK, ni sendas al tiu la anglan version de la multlingva informilo, kiun eldonis Rüdiger Eichholz, el Ontario, kaj la franclingvan ĝeneralan informilon de ESK. Ni ankaŭ proponis al K.E.A. plikonigi sin pere de *la Riverego*.

Dum tuta jaro

La estraro modifis la statuton, tiel ke nova membro de ESK restos membro dum tuta jaro ekde la pago de kotizo, kaj ne plu de januaro ĝis decembro, kiel antaŭe. Tiu decido efikos nur ĉe novaj membroj, sed ni memoru, ke granda parto de nia membraro konsistas el novaj membroj. Tiu statut-ŝanĝo estis diskutita dum la junia statuta ĝenerala kunsido, sed manko de kvorumo malebligis decidon pri tio.

Ĉu membro de K.E.A. plu?

Tiu kunsido ankaŭ diskutis alian statut-ŝanĝon proponitan de la estraro. Ĝis nun ESK estis laŭ sia statuto grupa membro de K.E.A., kio ebligis al ESKanoj membriĝi en K.E.A. kontraŭ malalta kotizo. Ĉar ŝanĝiĝas la kotiz-sistemo de K.E.A., tiu avantaĝo malaperas. La estraro tial proponis neniigi tiun parton de nia statuto. Sed mankis la kvorumo. Verŝajne estos referendumo.

Amika renkontiĝo de Amikoj

Ĝi okazis 27^{an} de majo, en la Montreala Esperanto-Domo. (Ni rapide konsciis, ke estis eraro situigi ĝin la 20^{an}, meze de longa semajnfino; sed esperantistaj kalendaroj malofte vidigas naciajn festojn...) Venis malmultaj homoj: tri Amikoj, kaj kelkaj akceptantoj. Kaj tiuj tri jam scipovetis Esperanton... La aranĝo sekve ekhavis tute alian etoson kaj celon: ne plu nur konigi la esperantajn movadon kaj kulturon,

sed ankaŭ bonvenigi novajn movadanojn. Unu prcelo tamen estis atingita: la tri bonvenigitoj ĉeestis la Rasinanrenkontiĝon.

La aranĝon ni certe refaros, preferinde en septembro aŭ oktobro, kun alvoko al la ekstera publiko.

Nouvelles de la Société

Avec d'autres associations

Pour mieux faire connaître l'espéranto, le C.A. a décidé d'entrer en contact avec des associations dont les membres pourraient être intéressés par l'espéranto. Normand Fleury a déjà approché une association de collectionneurs.

En Ontario

Il peut être utile de bien s'entendre avec ses voisins. Depuis déjà quelques années, les espérantistes d'Ottawa, maintenant siège de l'Association ontarienne d'espéranto, répondent à des demandes d'information, provenant parfois de Québécois ou d'Ontariens. Ces deux groupes pourraient être intéressés à notre Société, n'est-ce pas? La S.Q.E. a pu obtenir de l'association ontarienne une liste d'adresses. Tous connaissent maintenant la S.Q.E. et certains en sont devenus membres.

Dépliants en anglais?

Le C.A. a discuté d'une proposition de Victor Epp, membre de la Société, qui désirait que nous éditions nos propres dépliants d'information en anglais. Il a décidé de ne pas le faire, parce qu'il s'agit bien plus d'une tâche dévolue à l'association canadienne d'espéranto. La S.Q.E. incite d'ailleurs l'A.C.E. à mieux remplir cette tâche. Actuellement, si un

Québécois anglophone nous demande des renseignements sur l'espéranto, nous lui envoyons la version anglaise du dépliant de l'Ontarien d'origine allemande Rüdiger Eichholz (disponible en plus de 25 langues), en plus du dépliant ordinaire — en français — de la S.Q.E.

D'une année à l'autre

Le C.A. a amendé les règlements généraux de manière à ce que le membership dure une année complète à partir de la date d'adhésion, et non plus de janvier à décembre. Cette mesure ne touche évidemment que les nouveaux membres, mais, année après année, une grande partie de nos membres sont des nouveaux membres... On a discuté de cet amendement lors de l'assemblée générale annuelle, mais l'absence de quorum a empêché une décision finale.

Encore membre de l'A.C.E.

Lors de cette assemblée, on a aussi discuté d'un autre amendement proposé par le C.A. Jusqu'à présent, la S.Q.E. est membre affilié de l'association canadienne d'espéranto, ce qui permet aux membres de la S.Q.E. d'adhérer à moindre coût à l'association canadienne. Comme

l'A.C.E. change son système de cotisation, cet avantage disparaît. C'est pourquoi le C.A. suggère de rayer cette article de nos règlements. Vu l'absence du quorum, un référendum sera sans doute tenu.

Rencontre amicale

Le 27 mai a eu lieu la journée d'information des Amis de l'espéranto. (Nous nous sommes rapidement rendu compte de l'erreur de tenir une telle journée le 20 mai, tel qu'annoncé, en plein milieu d'une longue fin de semaine.) Peu de

personnes se sont présentées: trois Amis, en plus des organisateurs. Et les trois savaient déjà un peu d'espéranto... L'évènement a donc pris une tournure différente: il ne s'agissait plus seulement de faire connaître le mouvement et la culture espérantistes, mais aussi d'accueillir de nouveaux membres actifs. Les trois participants sont d'ailleurs venus à la rencontre, à Racine.

Il s'agit sans aucun doute d'une expérience à reprendre, sans doute à l'automne, et en invitant la population en général.

Membraro

Au début juin, la S.Q.E. comptait 148 membres, dont 71 Amis de l'espéranto. Parmi eux, dix-sept membres hors Québec; en voici la liste.

Komence de junio, t.e. komence de nia «oficiala» jaro, ESK havis 148 membrojn. Tio estas malmulta, kompare kun la antaŭaj jaroj. Ili dividiĝas en 77 ordinaraj membroj (inkluzive de la favorkotizaj kaj de la dumviva membrojn) kaj 71 Amikoj de Esperanto. Estas ankaŭ interese scii kiom da ili loĝas ekster Kebekio. Tiujn eksterkebekiajn membrojn la estraro devas aparte kaj unuope akcepti, laŭ la Statuto, kies verkintoj eble timis *invadon* de alilandanoj... Ili estas nuntempe dek sep, ĉefe el Ontario:

- Yves Bellefeuille, vicprezidanto de la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo, el Otavo
- Raymond Brisebois, el Pembroke
- Manŭelo Kampanjafía, prezidanto de la Ontaria Esperanto-Asocio, el Otavo
- Robert Derry, el Cumberland

- Kevin Doyle, el Gloucester, apud Otavo
- Gerald Gaskell, el Battle Creek, Michigan
- Charles P. Gauthier, el Otavo
- Merle Haltrecht-Matte, ĉefdelegito de U.E.A. en Kanado, el Orléans, apud Otavo (ŝia edzo, ankaŭ esperantisto, estas Guy Matte, prezidanto de la Fédération des francophones hors Québec...)
- Michael Larkin, Battle Creek, Michigan
- Guy G. Léger, el Moncton
- Cleve Lendon, el Otavo
- Greg Meadows, el Otavo
- Bernard Nicolau, el Otavo
- Raphaëlle Penny, el Otavo
- Doug Portman, el Westlake, Ohio
- Ian M. Richmond, eksprezidanto de K.E.A., el Londono, Ontario
- kaj John Starling, el Kalamazoo, Michigan.

Espero kaj Kio estus bezonata

elgermanigis Victor Epp

Espero

Mi esperas promesitan teron
Kiu jesas la pacon
Kiu jesas la liberon
Kiu jesas la justecon,
Ĉar ĝi jesas la amon.

Marvin Dürksen (kanadano, kiu verkis en la germana)

Kio estus bezonata

Iomete pli da paco kaj malpli da konflikto,
Iomete pli da boneco kaj malpli da envio,
Iomete pli da amo kaj malpli da malamo,
Iomete pli da vero —
Tio estas ja io!

Anstataŭ tiom da malamo, iomete pli da trankvilo;
Anstataŭ ĉiam nur mi, iomete pli da vi;
Anstataŭ timo kaj limigo, iomete da bona volo
Kaj forto por trakti —
Tio estus bonaĵo!

Hugo Vogt

Rencontre de jeunes [suite de la page 11]

Quant aux «veraj esperantistoj» de moins de trente ans, ne vous en faites pas: certains auront la chance de participer à la rencontre (des professeurs seront peut-être nécessaires!). D'autres informations seront bientôt disponibles sur *la Papago* (270-0054) et il vous est possible de vous inscrire en contactant:

- l'auteur, Janiko Vijo (Yanick Viau), Longueuil, en soirée 442-4865
- ou Patris Germain (Patrice Germain), Laval, 662-0816.

la Riverego

Esperanto-Societo Kebekia
Somero de 1990. Nro 19a.

Ĉi-numere :

Kiel informi, laŭ Reĝo
Denove en Saint-Irénée
Sur la renkonte à Racine
Réponses au questionnaire
Une rencontre de jeunes en août
Victor Epp: ĉu informi anglalingve?

Société québécoise d'espéranto
C.P. 126, succ. « Beaubien »
Montréal H2G 3C8